

AVENO 37 - Homaj Rajtoj tutmonde

aktuale 2011-06-01 ghis 2011-12-31

2011-12-18 **Vaclav Havel** mortis. Li estis unu el la elstaraj personoj de la chehoslovaka libereco-batalo kontraŭ la komunista sistemo, kaj la unua prezidento post la liberigo. Jen sprita vortumo de li: "Espero estas - kontraste al la optimismo - ne la ekspekto ke chio bone finighos, sed la engaghigo en la certeco, ke ghi estas senco-hava - sendepende de ghies fino."

2011-12 Rusio: en la tuta lando okazas manifestacioj kontraŭ la falsigo de la baloto-rezultoj. Kaj jam la administracia barado kontraŭ novaj partioj, entute kaj per la alta sojlo de 7% por eniri en la parlamento estas despotisma.

2012-12-21 **Sirio**: arabaj demokratoj nekredible sangoavide pli kaj pli amase mortigitaj en Sirio (260 ene de 2 tagoj). Dum la prezidento vorte interkonsentas kun aliaj arabaj ŝtatoj pri normaligo, li evidente samtempe ordonadas la mortigon de manifestaciantoj kaj disertintoj. En Kairo ankoraŭ mankas vere demokrata registaro; la nuna militara reĝimo batalas kontraŭ manifestaciantoj, ech preterlasante la moralan respekton kontraŭ virinoj. (Iau Bad. Ztg. 2011-12-21, p. 6)
Komento (AVE/mw): Aparte ne-kredible estas ke ankoraŭ la kristanoj subtenas Assad. Ju pli longe ili subtenas tian buchiston, des pli malfacile ili vivos en Sirio post lia falo.

2011-09-22 : Usono denove montris la fian flankon de sia vizagho.

Malgrau la nepraviteco de iam okazinta murdo Georgia-Usono mortigis Troy A. Davis. Pluraj iamaj atestantoj de tiu murdo retiris sian ateston, kaj restis nur 1 au 2, kiuj estis dubindaj.

Multaj homoj inter ili elstaraj petis gracon; sed ghi estis ne donita. Bonvolu kun-agadi kun la Nacia Koalicio kontraŭ la Mortpuno. Jam pluraj usonaj landoj abolicis la mortpunon - kaj pluraj kondamnitaj estis finfine liberigitaj pro malghusta akuzo. <http://www.ncadp.org/>

2011: Antau kelkaj monatoj la kataluna parlamento vochdone aprovis leghon malpermesantan "tauroluktojn" en la kataluna teritorio (tiel dirite "autonoma" parto de Hispanio). Pro tio multaj homoj insultis nin, katalunojn. Nun la hispana kaj franca registaroj volas, ke Unesko agnosku "tauroluktojn" kiel parton de la kultura heredajho de la homaro. Kia kruelajho! Kia teruro! Mi opinias, ke esperantistoj povas kampanji kontraŭ la propono de la franca kaj hispana registaroj. (Iau Ramon Pereira)

2011-09-01 **Palestino**: Por subteni la pacan kunvivadon inter la Jordan-rivero kaj la Mediteraneo: Esperanto havas la potencialon helpi al interkomprenigho kaj reciproka respekto. Ni subtenu la araban komisionon de UEA, UEA-konto "arabio" <araba.komisiono@esperanto.org> (Marie Helene Desert).

Paco-oazo en Israelo, kie lernas arabaj kaj judaj lernantoj la ambau lingvojn: Newe Shalom - Wahat al Salam (diversaj lingvoj, ankau **eo**) <http://nswas.org>

2011-08 **UNESKO akceptis Palestinon**, UN diskutas pri la akcepto de Palestino kiel sendependa ŝtato. Antau 64 jaroj UN akceptis la sendependan ŝtaton Israel.

UN-raporto de Robert H. Serry atestas progresojn rilate ampleksan strukturon por regi propran ŝtaton de la palestina popolo. La solaj problemoj estas la israelaj setlejoj en la Okcidenta Bordo kaj difeencoj en la popolo mem (Hammas, kiu regas en Gaza Zono). Necesus intertraktado inter palestinanoj kaj israelanoj.

Jam 118 membroj de la UN akceptis sendependan Palestinon. En Septembro ili alstrebas unuflankan akcepton de la UN-sembleo (sen interkonsento kun Israelo). Tamen nur la Sekureco-Konsilio rajtas finfine akcepti novan ŝtaton, sed Usono ghis nun kontraŭas tion - kaj havas la veto-rajton.

La SK diskutas - supozeble je la 24a de Augusto - pri tio: (Iau P. Simonitsch, Frankf. Rundschau 2011-04-13)

AVAAZ petas subteni la deziron de palestinanoj per subskribo, jen video pri la situacio kaj historiaj kauzoj: (en multaj lingvoj) http://www.avaaz.org/de/middle_east_peace_now/?cl=1239472123&v=10061

Rimarko AVE/mw: certe estus malfacila situacio malplekti la setlejojn kiuj estis (malleghe ?) konstruitaj en la Okcidenta Bordo; tamen por atingi pacon en tiu regiono kaj eble ankau kun la araba mondo entute necesas paca interkonsento. Alia problemoj restos - la ekzilitaj palestinanoj kiuj trovighas ankoraŭ en kampadejoj.

2011-12 **P.R. Chinio**: Chinaj civitanoj protestas kontraŭ administracia arbitra despoteco en Wukan en la provinco Guangdong. (Iau gazetoj kaj wikipedio)

P.R.Chinio nervozighas pri ebla civitaneca Jasmena Revolucio. S-ino Wang Lihong estas akuzita pro "trafiko-shtopigho" (au simile). Fakte shi defendas la civitanajn rajtojn kaj en Marto partoprenis publikan protestkunvenon. La jughprocezo okazas sen publiko; nau europaj diplomatoj kiuj volis partopreni ne ricevis permeson. Ahia defendanto ne ricevis aliron al la pruvajhoj. Al kritikis la proceduron. (dpa/BZ, 2011-08-13, p. 6)

2011-12-06 **Tibetanoj** mortbruligas sin; chifoje en Chamdu/P.R.Chinio.

Bedaurinde ankoraŭ la china politiko severe batalas kontraŭ chia movo de propra tibeta kulturo, malgrau tio, ke temas pri t.n. Autonoma Provinco. (de) http://www.tibet-initiative.de/de/die_tid/ueber_uns/

2011-08-16 **Ekzil-Tibetanoj** elektis chefministron. En kunsento kun la Dalai Lamao tibetanoj, kiuj vivas en ekzilo, modernigis la tradician - iomete feudan - sampersonan religian kaj regantan statuson.

La nova chefministro estas **Lobsang Sangay**. (Georg Blume, taz, 2011-08-10, p. 5)